Ж. 9а 8. 72

Jaro VI. Aprilo, 1925. Numero 8

BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO: por Bulgarlando 30 levoj. por fremdlando 50 levoj (0·75 Sm.)

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

АБОНАМЕНТЪ: за България 30 лв. Обявления: кв. см. 2 лева Отдѣленъ брой 3 50 лева

Препоръчано отъ М-о Н. Пр. за учил. библ. съ окр. № 1870 отъ 27. I. 1922

La interna ideo.

Interna ideo. Multaj parolas pri ĝi. Iuj por, aliaj kontraŭ, sed ĉiuj komprenas ian ideon kaŝitan en la lingvo mem. Oni diras:

— Esperanto portas ideon pri fratiĝo inter la popoloj, pri amo . . .

Sed oni ankaŭ rediras:

— Esperanto estas nur lingvo kiel ĉiuj lingvoj; kian ideon ĝi povas alporti? Oni ja ankaŭ en Esperanto kverelas; Esperanto estas uzata ankaŭ de ŝovinistoj por pure ŝovinistaj celoj, kiuj tute ne proksimigas nin al la interpopola fratiĝo.

Mi ne intencas prezenti al vi ĉiujn por-kaj kontraŭdiroj pri la Interna ideo. Ambaŭ partioj samtempe pravas kaj iom eraras.

Efektive la lingvo konsistas el elementoj, kiuj ne havas ion komunan kun la „ideoj". Vi konas la elementojn de la lingvo kaj vi bone scias ke inter ili estas nenia ideo, do en Esperanto ne povas sin kaŝi ia ideo; ĝi, kiel lingvo, ne havas internaĵon, sekve al ĝi mankas la tiel nomita „interna ideo".

Esperanto tamen servas al ni, al la ideoj, kiujn ni posedas kaj vastigas.

La interna ideo estas interne en ni, kaj al ĝi nome servas Esperanto. Vi bone scias kio estas la Interna ideo, sed vi ne devas atendi ke ĝi venu al vi kune kun la ellerno de la lingvo, ne, vi devas ĝin kulturi en vi, ke ĝi kresku kaj pere de Esperanto penetru en ĉiujn terangulojn.

La interna ideo devas vin transformi, plibonigi, ĉar ĝia unua postulo estas:

— la amo, amo al la proksimulo, amo al ĉiu.

Kaj se oni insistas ke Esperanto portas en si ian „interna ideo", la vero estas ke efektive

— Esperanto estas kreita por servi al la homoj de la tuta mondo, kiuj komprenis kaj alprenis tiun internan ideon.

Tiu „interna ideo" ne ekzistas de la tempo kiam kreiĝis Esperanto, ĝi estas malnova, kaj Esperanto venis en la mondon servi al ĝi.

Vi ja scias ke Esperanto servas al multaj personoj, por diversaj celoj kaj ĝiaj uzantoj sentas nenian ideon, ili restas la samaj homoj kun siaj malnovaj eraraj kredoj; al ili Esperanto ne malhelpas eĉ militi kontraŭ esperantistoj de alia nacio. Tio estas, ĉar ili ne sentas en si tiun „internan ideon", sed nur alprenis la lingvon por siaj celoj.

Se D-ro Zamenhof, la kreinto mem de la lingvo deklaris antaŭ la II Esperanto-kongreso en Ĝenevo, ke kun esperanto, kiu servas nur por praktikaj kaj komercaj celoj, li ne deziras havi ion komunan, li komprenis, nome, ke li ne deziras havi ion komunan kun tiuj personoj, kiuj uzas Esperanton nur por komercaj kaj aliaj bezonoj de la malnova mondo, sed ke li oferis sian tutan vivon por tiuj, kiuj bezonas unu facilan internacian lingvon, uzata kaj uzota nur por la noblaj celoj de la interhoma paco kaj amo, nur por vere homaj idealoj:

Amo, libereco, interkompreniĝo, reciproka helpado, frateco...

Altiĝu do unue ĝis tiu idealo esti vera homo, alprenu kaj kulturu *en vi* la „internan ideon" kaj nur tiam uzu Esperanton por semi konstante...

D. S.

ESPERANTA ANTOLOGIO

Al unu grafino

Vi vekiĝas en la bluo de l'maten' senbrua,
super vi salute svingas florajn branĉojn la siringoj,
kaj ekiras vi ebria pro arom' magia
al la suno kun plektitaj en hararo oraj ringoj.

Vin salutas la printempo — de la amo tempo,
papilioj ekenvias al gracia korpo via,
ĉirkaŭbrakas vin lazuro en la sinoj puraj,
kaj sur via frunto sorĉa dolĉe kisas vin radio.

Via vivo estas festo, de la amo nesto,
kaj ne konas via koro la ĉagrenon, la doloron.
En la sonĝoj vi nur ridas, vi nur belon vidas
kaj deziras nur feliĉon via amoriĉa koro.

Ja vi estas for de l'urbo de la homperturbo —
tie en la homaj koroj kreskas sole nigraj floroj,
ne penetras en kabanoj sunradia mano,
nur la Mort' — eterna sorto, kisas ame junajn korojn.

Dum labor', en bluzoj bluaj, niaj tagoj fluas
nin kuniras la turmentoj, dolorsentoj kaj ĉagreno,
sed ne konas vi, ĝojriĉa, nian grandfeliĉon:
povi viŝi for al iu unu larmon nur almenaŭ.

Sofia, 1925. *Zahari Zahariev.*

1. Sunsubiro

Sunsubir'. Ĉielo ruĝas
kaj sub ĝi — mortanta tag'.
Okcidenten sun' rifuĝas
post penega, granda vag'.

Tremetante sunradioj
adiaŭas kun akvar'.
Blankaj mevoj — revoj miaj
flugas foren al la mar'. :.

2. Aŭtuna skizeto

Flav-aŭtun, — sezono plora'. . .
Super urb' nebulo pendas
kaj interne, mia koro
pro la mank' de varmo plendas.

Jam aŭdebla ne plu estas
la ĝojiga kanto birda —
la petolo en la koro
ne plu brilas, ĝoje-flirta.

En branĉaro de la arboj
insideme siblas vento —
en animo dolorplena
regas, nestas griza sento . . .

Samokov. *Te-odoro.*

Resonoj

Al D. Debeljanov.

— La haveno de miaj deziroj
min allogas al lasta ripoz'.
— Kaj min vokas kruelaj admiroj —
de malĉasto purpura la roz'.

— Dormi pace en sonĵo nirvana
estas mia pasia sopir' . . .
— Ho, min tentas la tento satana,
min dissŝiras la fia dezir' !

— La alkovoj de mia sanktejo
tutpleniĝis je stranga dezert'.
— Mian karnon vampir-araneo
malĉastigas — kaj monstra vespert'.

— Mia vojo kondukas al alto,
kie brilas nur astro kaj stel'.
Ho, mi scias, mi scias ke baldaŭ
min tutkovros la nokta malhel'.

Sofia. *Asen Grigorov.*

Sunsubiro

Kiam la sunsubiro forsonoros kaj forrulos facilajn gutojn de laciĝo, Vi venu, ĉar tiam mi estas plej soifa por karesoj.

Kiam la sunsubiro forploros per lastaj radioj, ho venu, ĉar tiam mia animo, dorlotata de milda bluo kaj fluganta en rozaj gutoj, estas soifa por karesoj kaj amo.

Kiam la sunsubiro formortos, venkite de la vespero, vi venu konsoli la lamentojn de mia animo.

— — — — — — — — — — — — — — —

La pinoj tremetas en revoj.

La lunradioj rompiĝas kaj disfalas je mil eretoj, kiuj karesas la foliojn kaj saturas la aeron per aromo de ekzotikaj landoj.

Venu tiam, kiam Dio ekbruligas la stelojn kaj kiam la Momento fariĝas Eterneco, plilongiĝante ĝis senfino.

Venu dum la trankvila nokto, mi ornamos vian bruston per Blanka rozo . . .

La sekretoj nin karesos sen timo kaj malĝojo. La koro de l'eterneco surŝutos nin per sonĝaj floroj kaj per potencaj batoj ĝi kantos super mia sorto.

— — — — — — — — — — — — — — —

Vidu, la ĉieloj estas tiel trankvilaj. Super ni maldormas la patra okulo de nia Dio . . .

Venu! Ni sonĝados kaj preĝados ĝis aŭroro . . .

Sofia. *Dora Stanoeva.*

Luma strio

Al Sonjo.

La nigreta togo de senluna stela nokto sterniĝis sur la tero. Malproksimaj altaĵoj kaj proksimaj arboj kaj arbustoj staris senmovaj, kiel ekmortintaj dekoraĵoj de pentrista bildo, ĵus finita por rea riparo kaj mankigita de sia majstro-kreinto. Meze antaŭe kuŝis vastaĵo mara, simila al malhela kaj senkolora velura makulo. Nenie lumeto, nenie eĉ fajrero. Apenaŭ aŭdetas maronda plaŭdeto. Plena manko de vivsigno — ŝajne ekmortis eĉ la aŭtoro de ĉio ĉi.

Briletis nur la sennombra stelaro de l'ĉielo kaj blanketis iom la nokto nur pro ĝia brileto. Ĉu povas oni ne senti dezertecon en sia animo dum tia momento? Kaj ĉu povus oni toleri tian turmentan senton kaj ne serĉi pliesperigan signon de vivo inter tia tempo de morto? Ne!

Mia rigardo glitas ĉirkaŭen kaj haltas sur la velura tago de la maro, komencata de la alta bordo mem, en la abismo sub miaj piedoj, kaj finata malproksime per la rekta linio de l'horizonto. Kaj frapis mian rigardon io neordinara en la komuna tono de l'bildo senviva. Rekte antaŭ mi, de la bordo ĝis la horizonto, sur la mara veluraĵo senkolora, kuŝis arĝenta strio, en kies limoj vidatis la sulka dorso de la ondoj, movantaj kaj rebrilantaj

arĝentan lumon, kiel mil fajreroj, kiuj saltetas, brulas kaj estingiĝas. Kia estas la deveno de tiu ĉi luma strio sur la nigra ebenaĵo de l'senviva maro? Mi levis kapon ĉielen kaj komprenis. Inter palaj miliardaj steletoj brilis, ne alte super la horizonto, unu brilega astro. Ĝia lumo rebrilis sur la mara spegulo kaj kvazaŭ desegnis ies vojon. Tamen kies? . . . — Io trakuris mian cerbon kaj mi ellasis sopiron, kiam dekstraflanke, ĉe la malproksima horizonto, mi rimarkis marŝantan fajron.

En la malluma senviva nokto de l'mondo vagas la ŝipo de l'homaro. Ĉu signita estas ĝia vojo? Fakte en ĝi estas vivo — tie brilas fajroj kaj estas homoj, kvankam ĉirkaŭe regas dezerto.

La ŝipo marŝas malrapide, sed konstante. Antaŭ ĝi ne vidatas vojo, sed malintence ĝi direktas sin al mia rimarkita jam luma strio. Kaj la antaŭaĵo de l'ŝipo jen — jen tuŝas la strion; poste tuta eniris la strion; poste la fajroj de l'ŝipo ekstaris sur la strio] kaj fine, laŭ mia atendo, la tuta ŝipo turnis sin kaj ekmarŝis laŭ stria direkto. Jes! La ŝipo de l'homaro, portanta en si vivon, jam glitas sur vojo lume signita kaj celita. Muziko ekbruis en tiu ŝipo.

Fiera ĝojo trakuris mian animon kaj mi ellasis malpezigan sopiron kun feliĉa rideto. Tiam skuiĝis mia cerbo kaj antaŭ miaj okuloj ekstaris belega vizio.

Elpost la ŝipo elkreskis du blankaj ombroj, kies ambaŭ paroj da okuloj rigardis ĝoje la ŝipon. Modeste kontenta rideto tremis sur la lipoj. Super ties kapoj brilis la astro, kiel verda kvinradia stelo kaj verdeta estis la rebrila strio, signanta vojon celitan kaj celatan.

Mi komprenis. Antaŭ mi, sub la korpuso de l'ŝipo homara, kuŝis la vojo de l'modeste en laboro kaj espero forpasita vivo. Sindonaj al la homaro kaj fidelaj inter si, geedzoj D-ro Ludoviko Lazaro kaj Klara Zamenhof ĝin postlasis por edifo kaj sekvo de l'tutmondo.

Mi vidis tiujn gekamaradojn dumvivajn, kiuj jam mortintoj, vivos eterne en la koroj de homoj kaj, inter la mallumoj de l'malamo, de l'militoj kaj de l'egoistaj interesoj, direktos al idealo supera pri estonta tutmonda fratiĝo la popolojn nune dividitajn.

Utinam ĉiu geedza paro postlasu luman strion per sia vivo por la novaj generacioj! Ke oni tra mallumo densa sekvu luman vojon! . . .

Varna, 13. III. 1925. *Stela Morbilli.*

Ĉu vi estas membro de UEA?

Se jes, vi komprenis bone vian esperantistan devon. Se ne . . . aliĝu tuj. Nur kun la helpo de ĉiuj esperantistoj Esperanto fariĝas vere internacia lingvo, uzata en la praktika vivo per la servoj de UEA.

Pri la neceso de lingva Disciplino

kaj de aŭtoritata lingva centro skribis la 14. IV. 1910 Doktoro E. Fleischer, Dresdeno:

„La oficiala mezurilo „metro" estas kontrolata de internacia komisiono. Se ni sipozus, ke tiu ĉi komisiono ŝanĝus la longecon de la metro, tuj la tuta mondo enkondukas la ŝanĝitan metron, por ke tiu valora mezurilo konservu sian internaciecon.

Kontraŭe, se iu matematikisto (kio cetere estas fakto) trovus, ke la mezuro de la metro ne estas tute ĝusta, kaj sukcesus unuigi plurajn personojn en „Societo por la enkonduko de korekta metromezuro", tiu ĉi societo aŭ eble ĝia urbo (feliĉe tio ĉi ne estas fakto) mezurus per alia metro. Ja eble la magistratanoj sukcesus, konvinki la landan registaron, kaj tiam ilia landeto forlasus la internacie fiksitan mezurilon.

Tia „sukceso" komprenenble instigus aliajn matematikistojn al plua laboro, kaj baldaŭ iu alia fakulo farus reklamon por sia „ankoraŭ pli korekta" mezurunuo. Eble li konvinkus sian landeton, kaj tiam ankaŭ tie regus aparta mezurunuo. Fine, iom post iom, ĉiu regno kaj ĉiu landeto havus sian propran mezurunuon kaj la bona ĝenerala mezurilo „metro" ĉesus esti ĝenerala, ĉar pro la kondamninda malforteco de la centra aŭtoritato ĝi ne estus plu internacia.

Kaj tiel ĉiu nova vorto, kiu sen klarigo kiel neoficiala vorto troviĝas en gazetoj aŭ libroj, helpas detrui la internaciecon de Esperanto kaj povus fariĝi najlo en la ĉerko de nia movado".

Feliĉe la prudenteco de la Esperantistoj kaj la konstanteco de la Akademio evitis tiun ĉi elrevigon de nia Esperanta movado. Sed estas necese, atentigi kelkfoje denove pri la danĝeroj, por ke ĉiu konu la sekvojn de la kaprica sinteno en la uzado de nia lingvo.

Pri landnomoj

Tie ĉi mi deziras bone klarigi por tiuj, kiuj ĝin ne bone komprenis, la sistemon de nia majstro pri la landnomoj.

1-e. Koncerne la landojn de la Malnova Mondo (Eŭropo, Azio) la indiĝena popolo donas sian nomon al la lando: germano, Germanujo, ĉeho, Ĉeĥujo, slovako, Slovakujo, kunmetitaj Ĉeĥoslovakujo, k. t. p.

Tamen la landnomojn, kiuj finiĝas per . . . lando, Doktoro Zamenhof konservas senŝanĝe: Holando (regnano: holandano).

2-e. Koncerne la landojn de la nova mondo (Ameriko, Afriko, Aŭstralio), kie la enmigrintoj fakte malaperigis la indiĝenan popolon, li alprenas la nomon mem de la lando, esperantigante ĝin: Peruo (peruano), Maroko (marokano) k. t. p.

Forprenu — ujo, vi havas nomon de la regnano, forprenu — ano, vi havas nomon de la lando.

3-e. Koncerne la nomojn de la provincoj Z. prenis la provincan nomon, esperantigante ĝin, kiam eble.

Ĉu neklara, ĉu anarkia tia sistemo? Ne!

„Neniu sistemo (pri la landnomoj), skribis Prof. Grosjean-Maupin, la Akademia Raportinto pri la demando (1922). „estas plene rekomendinda el *teoria* vidpunkto; pro tiu ĉi motivo ni devas konsideri nur la *praktikan* vidpunkton, el kiu la fideleco al la ĝisnuna tradicio (la Zamenhofa) estas pli sendanĝera ol iu ajn provo".

Th. Carl, Prezidanto de la L. K.

Организационни въпроси

Бидейки въ продължение на три години секретарь на Българското Есперантско Дружество азъ бѣхъ въвелъ въ практика щото винаги предъ годишния конгресъ на дружеството въ „ВЕ" да се разисква по въпроси около организацията, като всѣка година въ статия изказвахъ мнѣнието си върху онова което е, и което би трѣбвало да се направи, което мнѣние въ общи черти бѣ споделяно и отъ останалитѣ членове на Централния Комитетъ.

Днесъ като не съмъ вече секретарь на дружеството и нѣмайки намерение да бѫда за въ бѫдаще такъвъ, азъ мога по-свободно, безъ страхъ да бѫда обвиненъ, че се грижа за мои лични интереси, да занимая българскитѣ есперантисти съ единъ въпросъ, който миналата година бѣ подигнатъ нѣкакъ нерешително (пакъ отъ менъ) и който не получи правилно разрешение на годишния конгресъ. Касае се за постояненъ секретарь, не избиранъ ежегодно, а назначаванъ такъвъ отъ Централния Комитетъ.

Миналата година мнозина не добре освѣтлени по въпроса се уплашиха отъ такова едно положение, други недоволни може би лично отъ менъ и страхувайки се, че това се иска съ цель да се закрепостя азъ на секретарската длъжность, трети навѣрно аспирирайки за сѫщата и надѣвайки се въ скоро време да ме замѣстятъ, се противопоставиха решително на предложението за стабилизиране секретарската длъжность и то пропадна. Обаче азъ не мисля, че това решение на единъ конгресъ трѣбва да остане за дълго, още повече виждайки че конгреса е решилъ не добре за правилното развитие дѣлата на дружеството. И азъ наново подигамъ този въпросъ, за да бѫде той сложенъ на разглеждане въ предстоящия конгресъ. Днесъ, не можейки да бѫда обвиненъ, че целя съ това предложение осигуряване на лични интереси, азъ мога да настоявамъ по-енергично за възприемането на това положение въ дружеството.

Всичко, което съмъ казалъ въ миналогодишната статия по въпроса (ВЕ, год. V, кн. 11—12) го подържамъ и днесъ. Работитѣ на дружеството се развиха вече до толкова, че нашето отнасяне съ тѣхъ трѣбва да бжде много по-сериозно, отколкото е било въ миналото, когато цѣлата канцелария се е побирала въ джоба на секретаря. Днесъ ние имаме доста голѣма канцелария, ние имаме имущество, издателство, които искатъ ржководитель опитенъ. Всѣки ще признае, че единъ конгресъ не може да направи правиленъ подборъ на такъвъ ржководитель. Вънъ отъ това, да допуснемъ дори, че годишнитѣ конгреси ще избиратъ ежегодно все най-опитнитѣ измежду насъ, това ще бжде само отъ вреда за дружественитѣ работи, тъй като съ смѣната на секретаритѣ, ежегодно трѣбва да става приемане и предаване на длъжностьта и имота, което влече съ себе си единъ-два месеци бездействие въ центъра, а какъ се отразява подобно бездействие върху дружественитѣ работи нѣма защо да казвамъ. Това се опита миналата есень. Всѣки новъ човѣкъ, обаче, ако ще да е той и най-опитния, има нужда отъ нѣколко мѣсеци докато се ориентира въ новата си работа, презъ което време той не може да предприеме нѣщо сериозно. Знайно е при това, че опитнитѣ работници се създаватъ отъ дълга практика, защо тогава ние не поискаме да си създадемъ опитенъ секретарь като го оставимъ да работи до когато той може и желае това.

Но може нѣкой да каже, че сме съгласни единъ човѣкъ да бжде по-дълго време секретарь, но искаме да си запазимъ правото да го преизбираме ежегодно. Това не е разрешение. Ако вие искате да оставите единъ човѣкъ да работи съ преданость възложената му работа, вие трѣбва да го осигурите, че нѣма следъ нѣколко месеца по вашъ капризъ да го изхвърлите на улицата безъ работа, защото безъ такова осигуряване, той не би могълъ да се отдаде на работата си така, че да бжде единъ действително опитенъ секретарь. А ако вие му дадете нѣкаква реална гаранция, че въ продължение на известно число години, до като той си гледа работата добре, ще го избирате винаги за секретарь, то това е равносилно да се възприеме онова, което предлагамъ: да не се избира, а да се назначава секретаря. Не мислете, че като е назначенъ, той не може да бжде замѣненъ въ случай, че си не гледа работата. Така е вредъ кждето работата изисква стабилитетъ, това прави и държавата даже. Кое пречи щото и ние да възприемемъ онова, което е действително необходимо за добрия вървежъ на нашата работа? Нищо?

Това по въпроса за секретарската длъжность. По другитѣ актуални въпроси около нашата организация има думата секретаря на дружеството.

Д. Симеоновъ,

Inter ni

Karaktera trajto de ni, la esperantistoj, estas nia partopreno per esperanto en unu varia kaj vasta internacia vivo, niaj konstantaj rilatoj kum homoj el diversaj nacioj.

Oni devas kredi, ke tiu ĉi internacia vivo, tiuj ĉi komunikoj kun homoj de diversaj kulturoj kaj de diversaj edukoj, efikos sur nian kulturon, sun niajn morojn, kaj forigos el nia karaktero la malbonajn flankojn, kiujn ni heredis de nia nacio.

Kaj tiel devas esti. Se tio ne estas — ni estigu ĝin! Ni pruvu, ke la internacia vivo povas efiki eduke sur la homojn.

Vivante en komunikoj kun aliaj nacioj, ni devos ekkoni ilin, iliajn pozitivajn kaj negativajn kvalitojn, kompari nin kun ili, ekkoni same niajn bonajn kaj malbonajn kvalitojn, kaj purigi niajn karakterojn.

Ni alprenu la akuratecon de la angloj, la ardon de la francoj, la metodecon kaj sisteman persistecon de la germanoj. Ni kunigu ilin kun la laboremo kaj obstineco de nia nacio, kaj ni montru al nia socio, kion povas fari la internacia vivo por reeduko de la individuo kaj por nobligo de la karaktero.

Sed ni purigu nin de kelkaj malbonaj kvalitoj de nia popola karaktero.

Ni lernu unue esti sinceraj kaj diri malkaŝe, sed *ĝentile* la veron. Ni lernu toleri la opinion de la ceteraj, kvankam ĝi eble diferencas de la nia, kaj renkonti kviete ĉiun kritikon. Sed ni lernu samtempe kritiki *lojale* kaj *ĝentile*. Donu viajn argumentojn, montru la faktojn, faru la konkludon — sed gardu vin, ne eldiri, en via ardeco, akrajn vortojn, kiuj ofendus personon. Super ĉio — ĝentileco, reciproka estimo kaj toleremo.

Sed pleje ni devas nin gardi de unu malbonega, naŭziga, abomena kutimo: *la klaĉado*, la postdorsa kritikado. Tiu ĉi malinda praktiko, kiu bedaŭrinde ekzistas ĉe nia popolo, humiligas la homon, kiu uzas ĝin, venenas la atmosferon en nia vivo, makulas ĉian belecon de idea movado. Ĝi mortigis jam unu grandan bulgaran poeton. Ĝi infektas kaj detruas multajn organizaĵojn en nia lando.

Samideanoj, ni gardu nin de tiu ĉi abomenega emo. Se ni havas ion por diri — ni diru ĝin malkaŝe — kompreneble, ne malĝentile — en la ĉeesto de la koncernata persono. Se ni duonaŭdis ion, kion ni ne bone komprenis, ni ne rapidu ĝin disfamigi dekstren kaj maldekstren sed malkaŝe ni petu informojn de la persono koncernata. Se ni ion aŭdas pri iu ajn, ni ne rapidu blinde kredi, sed kun rezervo akceptu ĉion kaj serĉu detalajn informojn, antaŭ ol ni ekkredos kaj publike ripetos la aŭditon. Kaj se iu venos al ni kaj komencos paroli malbone pri forestanta persono, ni invitu lin ĉesi paroli en la momento kaj levi tiun demandon en ĉeesto de la koncernata persono.

Se nia esperanta vivo povas elkuraci nin de la klaĉemo, esperanto estos ludinta gravan rolon por la nobligo de nia karaktero.

Ni pruvu, ke la internacia vivo efikas sur nian kulturecon!

Akcipitro.

Esperanto-movado

Enlanda.

Sofio. — La 15-an de Marto la sofia sekcio okazigis amuzvesperon en la salono de societo „Majka". En la literatur-muzika parto partoprenis sinjoro St. Milenkov kaj sinjoroj Aleksandro Nakov kaj Nestor Ljutov. Enspezo neta 4000 levoj.

La sofia sekcio lastatempe malfermis kurson por fervojistoj. Gvidas sinjoro K. Kirkov.

En la klubo de la sofia sekcio estas instalita la biblioteko de BES. Ĉiuj membroj havas rajton preni librojn el tie. Ĉiuj samideanoj ankaŭ tiuj el la provinco, kiuj volus helpi nin, estas petataj sendi al ni librojn, kiujn ili jam tralegis kaj volonte ilin donacus al iu ajn biblioteko. La librojn sendu al la redakcio de BE, notante, ke ilin vi sendas por la biblioteko. Al ĉiuj donacontoj koran antaŭdankon!

Ĉirpan. — Dank' al la klopodoj de nia samideano Ĥristo Zlatarev, estas fondita esperanta grupo „Mondamikeco".

Estas elektita la jena estraro: Ĥristo Zlatarev, Vasil Denizov, Jovĉo Georgiev kaj Petar Stefanov, kaj kontrola komitato: Todor Kabzamalov, Kiro Kostadinov kaj Nikola Nikolov.

Estas malfermita esperanta kurso. Gvidas Nikola Kostadinov. Partoprenas ĉirkaŭ 40 personoj.

v. Batak. — La 12-an de Januaro estis malfermita esperanta kurso. Gvidas Petar Toŝkov. Enskribiĝis 25 personoj. Estas notinde, ke granda entuziasmo kaj intereso regas inter la kursanoj.

Sliven. — La 8-an de Februaro antaŭtagmeze la gelernanta esperanto-grupo „Radio" aranĝis matenfeston kun tombolo. Oni kolektis ankaŭ monon por la „esperanto-hejmo".

La 8-an de Februaro estis malfermita kurso por geurbanoj en la jernejo „Generalo Kesjakov". La kurso estas gvidata de nia samideano Ivan Kirov.

La geurbana esperanto grupo „Espero" malfermis esperantan kurson. Partoprenas pli ol 50 personoj.

v. Sadovec. — La 17-an de Januaro okazis la jarkunveno de la loka grupo. Estis elektita nova estraro: Vladimir Jotov, Sejko Pironski, Atanas Lakov, Penĉo Mjankov kaj Todorka Mirĉeva, kaj kontrola komitato: Lazar Panov, Isak Sidov, M. Simov kaj Ĥr. Nedkov.

Razgrad. — La 16-an la februaro okazis la jara kunveno de la esperanto-grupo „Venko". Estis elektita nova estraro: Ivan Nenov, Petko Popov, Danail Ĥristov, Ljuben Nenov kaj Venko Dobrev, kaj kontrola komitato: Jordan Trifonov kaj Todor Valkanov.

La 8-an de Marto la esperanto-grupo malfermis kurson por geurbanoj. Enskribiĝis 25 personoj.

La orkestro de la societo de la „bulgaraj blinduloj" vizitis ankaŭ Razgrad-on. Tie ĝi donis kelkajn koncertojn, Antaŭ la komenco de la koncertoj ili faris demonstracion per siaj literoj, maŝinoj kaj esperantaj libroj. Ilia vizito vekis denove la intereson de la geurbanoj al la esperanta movado. Unuj enskribiĝas en la kursoj, aliaj serĉas lernolibrojn por memstara ellerno de la lingvo. Entute estas rimarkita granda intereso al nia afero.

v. Zinĝirli-Kujĝuk. — Nia turka samideano Mustafa Krimski malfermis esperantan kurson por la tieaj turkoj-instruistoj.

v. Kabakulak. — Kelkaj esperantistoj jam vigle eklaboris por nia afero.

Popovo. La 1-an de Februaro posttagmeze estis malfermita kurso por geurbanoj. Gvidas G. Kalĉev. Partoprenas 35 personoj.

Ĉiudimanĉe la esperanta grupo aranĝas promenadojn, dum kiuj oni parolas nur en esperanto.

Eski-Ĝumaja. — En la ejo de la sporta klubo „Vazpitatelno Ogniŝte" estas malfermita kurso de esperanto. Partoprenas 15 personoj. Gvidas Ĥristo Kolarov.

Trojan. — La 22-an de Marto la grupo aranĝis publikan paroladon. Sinjoro Mirĉo Vasilev paroladis pri „Ĉu la internacia lingvo Esperanto estas ebla". La aŭskultantoj, kiuj estis proksimume 150, tre ekinteresiĝis pri nia afero.

Burgas. — La malnova esperanto-grupo estas renovigita, kaj vigle eklaboris.

Ĉiusabate la grupo aranĝas kunvenojn.

v. Kostandovo. La 18-an de Marto estis malfermita esperanto-kurso por geinstruistoj kaj vilaĝanoj — inteligentuloj. Partoprenas 13 personoj. Gvidas Manol Stoimenov.

v. Trambeŝ. — La 1-an de Aprilo estis aranĝita interkonatiĝa vesperfesto.

Ruse. — Dum la lastaj kvar monatoj la grupo „Solidareco" aranĝis du amuzfestojn, kaj unu matenfeston, kiu okazis la 12-an de Aprilo. En ĝi partoprenis Iv. Kovaĉev, M. Martinov kaj unu instruistino.

Por furiozi kaj mortigi, oni ne bezonas veran kuraĝon. Mi havas anglan rashundon, kiu da tia kuraĝo posedas tiom, kiom la tuta bulgara nacio kaj la tuta rusa armeo kune; sed ĝi lasas sin vipfrapi de mia stalservisto. Tiaj, precize, estas ankaŭ viaj soldatoj. Viaj mizeruloj estas kapablaj tranĉi la kolon de aliaj homoj; sed ili timas siajn oficirojn, ili toleradas ofendojn kaj batojn; ili eĉ ĉeestas kaj trankvile rigardas, kiam oni punas iliajn kamaradojn kiel malgrandajn infanojn, ja pli hontinde ankoraŭ: ili eĉ partoprenas tian agon, se oni tion ordonas al ili.

Montru al mi viron, kiu kontraŭstaras ĝismorte al ĉia ajn potenco, ĉu tera ĉu ĉiela, kiu volus devigi lin, agi kontraŭ la propra konscienco. Nur tia viro estas vere kuraĝa.

El „Herooj" de Bernard Shaw.

Sciigoj — Известия

Diversaj.

— AT. D. ATANASOV — ADA eldonos sian verkon „REMEMOROJ DE ESPERANTISTO“, se almenaŭ 700 samideanoj antaŭpagos po 1 ekzemplero (15 levoj), aŭ se 30 grupoj kolektos po 400 levoj por la celo. Sendu ĉion al la aŭtoro, At. D. Atanasov, Oboriŝte, 44, Sofia. — Dezirinde estas, ke la libro aperu antaŭ la kongreso.

— Dum Februaro nia samideano Al. Iliev el v. Turski-Trastenik baptis sian filineton. Oni donis al ŝi la belsonan nomon Esperantina.

— La 1-an de Marto nia samideano Rad. Triĉkov el Vraca baptis sian filineton. Al ŝi estis donita la bela nomo Esperantina. Imitindaj ekzemploj!

De la redakcio.

— Nia kunredaktanto Atanas D. Atanasov pro troa okupiĝo eksiĝis el la redakta komitato. La C. K. akceptis lian eksiĝon kaj liberigis lin de la redakta Komitato.

XII Bulgara Esperanto-kongreso, Sofio.

Alvoko

Por la XII Kongreso en Sofia estas projektata granda ekspozo de Esperantaj libroj.

La Societa Biblioteko nun posedas proksimume nur 100 librojn kaj libretojn — nombro mizerega, tute ne koresponda al la grandaj dimensioj de nia movado en Bulgarujo. Ĝis nun oni improvizis Esp.-ekspozojn en Sofia hazarde pruntemprenante librojn de privataj samideanoj. Pli ĝenerala utiligo de libroj ne povis esti efektivigata, — ĉar ja libroj ĝis nun mankis ĉe la Societo. Aparta elspeza paragrafo por havigo de libroj por la Biblioteko, en la buĝeto de la Societo por la jaro kuranta mankas.

Ĉi-ĉio instigas la Aranĝan komitaton alvoki la gesamideanojn tuta Bulgarujo, ke ili rapide kaj racie helpu per grandara donacado de libroj. Kiu ne havas librojn, li oferu ian monsumon, per kiu la Societo anstataŭe aĉetus librojn.

La senditaj libroj formos la fundamenton de Biblioteko, kies utiligo estas ĝeneraligota por la tuta Bulgarujo.

Samideanoj, ne hezitu helpi, — la afero urĝas ja!

Ĉiun sendaĵon kun surskribo „*Por la Ekspozo*“ oni adresu al Bulgara Esperanto Societo, strato Car Boris, 69, Sofia.

La nomoj de la donacintoj estos publikigataj en „Bulgara Esperantisto“.

La Aranĝa Komitato.

Alvoko

Karaj samideanoj!

La esperanta kolektanta klubo „Amikeco" komencas jam sian duan jaron. Ĝia organo estas plibonigita kaj aperos je ĉiu 4. au 6. semajno. La gesamideanoj estas petataj subteni tiun entreprenon, aliĝante al la klubo kaj propagandi ĝin en la esperanto-rondoj. Ĉu ni restos en ĉi tiu rilato malantaŭ la aliaj landoj? Tion montros via intereso.

Ĉion sendu al la jena adreso: Vasil Ivanov, XII linia, № 17, Varna.

Instruista fakkunveno

Tiuj, kiuj partoprenis nian dekunuan kongreson kaj vizitis la instruistan fakkunvenon tie organizitan, certe rememoras la modestecon kaj la konsenton, kiuj regis tiun kunvenon. Dum la kongreso en Sofio ni devas ankaŭ organizi tian kunvenon. Nia samideano Ivan Sarafov el Pleven proponas, ke ni fondu ligon de geinstruistoj-esperantistoj en Bulgarujo. Alia samideano el Sofio deziras prelegi pri la novaj metodoj de la edukado. Eble ankaŭ aliaj samideanoj dezirus proponi aŭ prelegi ion ajn. Tiel ke la aranĝo de tia fakkunveno estas nepre necesa. Nia samideano Geo Ĥarŝev el Sofio konsentis preni sur sin la zorgon pri la aranĝo de tiu fakkunveno. Ĉiuj samideanoj, kiuj intencas viziti ĝin, kaj ankaŭ tiuj, kiuj deziras fari proponojn, estas petataj skribe sciigi tion al la organizanto. Ĉio devas esti sendata al la jena adreso: G. Ĥarŝev, strato Gurguljat, 19, Sofio.

Somera Uuiversitato en Esperanto

Dum la XVII Universala Esperanto-Kongreso, kiu okazos nunjare en Ĝenevo de la 3-a ĝis la 7-a aŭgusto estas aranĝata ankaŭ Somera Universitato en kiu famaj scienculoj prelegos en Esperanto pri jenaj sciencoj:

Psikoanalizo kaj pedagogio,
Internacia organiza juro,
Historio kaj evolucio de la lingvo,
Elektrotekniko kaj Radio.

Tio estas la unua provo en la Esperanto-movado apliki nian lingvon en pure sciencaj aranĝoj.

Ni kredas ke tiaj provoj ripetiĝos estonte ĉiujare dum niaj mondkongresoj kaj ke la aranĝantoj de la Somera Universitato havos la zorgon eldoni en apartaj verkoj la lekciojn de la profesoroj prelegotaj dum la nunjara sesio.

Niaj mortintoj.

Kun malĝojo ni sciigas al niaj gesamideanoj, ke nia grupo je 15. Marto perdis unu el siaj plej fervoraj batalantoj

MARA PAVLOVA

Instruistino en v. Ĝumaja

Eternan pacon al ŝi.

La Esperanta Grupo en T.-Pazarĝik.

La 24. de Marto, j. k. mortis en Sofio

NIKOLA PETKOV

malnova instruisto de matematiko, patro de la honora membro de BES sinjoro Simeon Petkov.

Niajn kondolencojn al la funebrantoj!

Lastatempe la esperanta movado perdis tri fervorajn agantojn:

ST. STAJKOV

Direktoro de gimnazio en Dupnica

AL. LJUDSKANOV

20 jara, lernanto el Gorna-Orehovica

AL. MALĈEV

el Varna.

ЧРЕЗЪ ЧЕТЕНЕ КЪМЪ МЕЖДУНАРОДНА КУЛТУРА!

ESPERANTIO

най-доброто есперантско списание, голѣмъ форм. 16 страници, разкошни илюстрации, общественъ и художественъ животъ. Излиза въ Берлинъ. 10 броя — 100 лева. Проб. брой — 10 лева. „Пъленъ учебникъ по Есперанто съ упражнения, граматика, христоматия и 2 речника“ — 20 лева. „Mia Amiko“, читанка — 12 лева; „Guto post Guto“, антология — 12 лева; Zamenhof: La deveno de Esperanto — 9 лева; I. London: Ĥinago — 12 лева; L. Tolstoj: Dio unu por ĉiuj — 4·50 лева; „Garŝin: Signalo — 9 лева; K. Balmont: Blanka Cigno — 9 лева; Kuprin: Laŭroj — 3 лева.

Прибавяйте 5 % за пощенски разноски.

СТ. ХРИСТОВЪ — Вел.-Търново.

КООПЕРАТИВНО Д-ВО „ПОСРЕДНИКЪ“

СОФИЯ, улица Витошка, 48

Доставя избрана есперантска литература:

Fundamenta Krestomatio . . 80 лева	Krucumo — A. Drozdov . . . 14 лева
Vortaro de Kabe . . . . 70 „	Aŭtuna vespero . . . . 7 „
Hamleto-Shakespeare. . . . . 45 „	La morto de la delegito de UEA — N. Hohlov . . . . 7 „
Ifigenio en Taŭrido — Goethe 50 „	La Familio Gerak—Elin Pelin 14 „
Faŭsto, I parto — Goethe . . 40 „	Albrecht Dürer kun 28 reproduktajoj . . . . 45 „
La Rabistoj — Schiller . . . . 35 „	
La Revizoro — Gogol. . . . . 35 „	

LIBERO

ГОЛѢМО МЕЖДУНАРОДНО СПИСАНИЕ САМО НА ЕСПЕРАНТО.

Органъ на международни движения за реформиране живота въ името на любовьта и равенството между хората. Ще застѫпва и „Вѫтрешната Идея“ на Есперанто.

Първото международно списание, издавано въ България, поради което е и най-достѫпното есперантско списание за българскитѣ есперантисти, като най-евтино:

Годишенъ абонаментъ 60 лева.

Първата книжка (въ две печатни коли) ще излезе въ края на месецъ априлъ.

Разпространете го най-широко. Посочете го на приятели не есперантисти, които се интересуватъ отъ идеитѣ му, като така ги заинтересувате за Есперанто.

Есперанто ще успѣе когато почне наистина да служи въ практическия животъ — ето случай да го въведемъ въ практика всредъ идейни течения.

Всичко за LIBERO се изпраща на адресъ:

LIBERO, ул. Витошка, 48.

До Aŭstra Esperantisto

Hobengasse 12-2-13

Korneuburg

Австрия. bei Wien. Aŭstrujo

ЕСПЕРАНТИСТИ!

Набавяйте си и разпространявайте преди всичко изданията на Българското Есперантско Дружество, съ което го подпомагате да бжде финансово засилено.

Курсъ по Есперанто, IV издание . . . . 20·— лева
Практична граматика на межд, езикъ Есперанто . . 3·— „
Възможенъ и нуженъ ли е единъ межд. помагаленъ езикъ (проф. Д-ръ Ив. Шишмановъ) . . . . 3·— „
Първа конгресна речь на Д-ръ Заменхофъ. . . . . 2·— „
Врора „ „ „ „ „ . . . . 2·— „
Трета „ „ „ „ „ . . . . 2·— „
Четвърта и пета „ „ „ „ . . . . 2·— „
Портретъ на Заменхофъ (30/45 см.) . . . . 10·— „
Пощенски карти (Заменхофъ и отъ XI конгресъ) . . 1·— „
Пропагандични пликове . . . . 0·35 и 0·60 „

Есперантски значки (зелена звезда съ надписъ „Есперанто“, зелена звезда на бѣло поле — малки, зелена звезда на жълто поле и наоколо зеленъ кржгъ съ надписъ) — съ игла, брошка или за втикваие въ дупка, (6 вида) по 12, 13, 16 и 20·— „
„Literatura Mondo“, год. II, 12 книжки . . . . 120·— „
Отдѣлни броеве отъ сжщото списание . . . . . . 12·— „
Стари броеве отъ „Esperanto Triumfonta“ . . . . . 6·50 „
Броеве отъ II, III, IV и V год. на „Bulgara Esperantisto“ 1·50 „
Освенъ това се доставятъ:
Речникъ еспер.-бълг. отъ Хр. Бъчваровъ, подвързанъ 48·— „
„ „ „ „ „ неподвърз. 35·— „
Речникъ есперанто-български и български-есперанто отъ Ив. Кръстановъ . . . . 47·— „
Bulgara Antologio отъ Ив. Кръстановъ . . . . . . 100·— „
Сжщность и бждащность на идеята за единъ международенъ езикъ отъ Unuel . . . . 7·— „
За международния езикъ (анкета) . . . . 5·— „
Ŝercoj kaj incitoj, игра за говоримо изучване на есперанто, състояща се отъ 100 въпроси и 100 отговори . . . 60·— „
Ключъ на Есперанто (граматика и речниче) . . . . 3·50 „
Прибавяйте 20°/₀ за пощенски разноски.
За пощенски разноски на звездичка прибавяйте 3 лева, а по 5 лева за две и повече.

REDAKCIA KOMITATO:

Dimitr Simeonov. — Zahari K. Zahariev. — Asen Grigorov.

Adreso de la redakcio: Sofio (Bulgario), str. Car Boris, 69.

София. — Печатница Б. А. Кожухаровъ. — Телефонъ 1894.

BULGARA ESPERANTISTO
Sofio-str. Car Boris, 69